

La 16an -18an de oktobro 2015

Prezentado de dramoj kaj kantoj en la elementa lernejo Tooni

La 17an okazis prezentado de dramoj kaj kantoj en la elementa lernejo Tooni de la urbo Kamaiŝi en la gubernio Iŭate. La fiŝkaptista vilaĝo Tooni estis multe detruita de la cunamo en 2011 kaj multaj perdis domon kaj laborejon, do des pli suferis/as gelernantoj tie. Eksa instruistino s-ino Takadate komencis helpi ilin kaj organizis Fonduson “Espero”. Mi partoprenis en ĝi en junio 2011 kaj agadas por la Fonduso jam pli ol 4 jaroj.

La gravaj eventoj por ni, fondusanoj, estas “Prezentado de dramoj kaj kantoj de la elementlernejoj” okazanta en oktobro kaj “Kursfina ceremonio de la mezlernejo” okazanta en marto. Estas duone devige por mi kiel la vicprezidanto de la Fonduso partopreni en la du eventoj. Mi vizitis la lernejon kun Pradip el Nepalo.

La urbo Jamada

Por ĉeesti en la Prezentado, ni devis tranokti en la urbo Kamaiŝi en la antaŭa tago, la 16an, do ni unue vizitis la urbon Jamada, pli nordan urbon de Kamaiŝi.

La urbo Jamada estas fiŝkaptista urbo, kiu havis 190 000 loĝantojn antaŭ la katastrofo, kaj nun havas 160 000. En la cunamo 743 homoj mortis aŭ perdiĝis kaj 3357 domoj detruigis aŭ forbrulis, ĉar post la cunamo okazis granda incendio. En la monteto Mikurajama oni montras nigre bruligitan horloĝon de la jam malaperinta stacidomo Jamada.



Kial tiom multe da homoj mortis pro la cunamo? S-ro Tamura Gooiĉi, eksaj instruisto kaj membro de la urba asembleo, atribuis la kialon al “3-metra cunamo”, prognozo de la Meteologia Agentejo. Aŭdinte tiun prognozon, multaj homoj opiniis, ke la kontraŭcunama digo baros la 3-metran ondon kaj ne rifuĝis. Nun oni konstruas grandan digon laŭ la marbordo. Ĉi tie oni uzas grandajn tubojn. Mi miris pro diversaj konstruadmanieroj de digo.



Ni lasis nian valizon al konata fiŝvendejo kaj ekpaŝis al la urbodomo, kaj ni tuj rimarkis, ke malaperis provizoraj vendejoj, kaj tie, anstataŭe aperis 5-metre alta tereno. Laŭ la klarigo, tiu tereno sinkos post 1-2 jaroj kaj estiĝos 2-metre alta tereno, kaj pli poste sur ĝi oni konstruos vendejojn, oficejojn kaj fabrikojn. La suba foto montras estontan, centran parton de Jamada. Je mia miro, supre estas skribita: “La vendejaro de Jamada nove naskiĝos en tiu ĉi vintro”. Ne kredeble! Du monatojn poste venos vintro! Ĉu mi miskomprenas? Tamen mi esperas, ke la urbo reviviĝos laŭ la plano.



La plej grava motivo viziti tiun ĉi urbon estis renkonto kun s-ino Kaitani Mijako (la dua de dekstre), kiu antaŭe estis barbiredzino, sed nun vendas kukojn kaj ludilojn al infanoj. Ŝi ĉiam ridetas kaj tre ĉarma, malgraŭ la granda sufero. Ŝia eta vendejo estis inter la provizoraj vendejoj, nun kie ĝi iris? Ni trovis, ke la vendejaro translokiĝis al alia loko pro la teraltigo. Ni sukcesis renkonti ŝin. Ni ĉiuj estis

tre ĝojaj.

En la elementa lernejo Tooni

La 17an de oktobro, matene ni ekiris de la stacidomo Kamaiŝi per buso al la elementa lernejo Tooni. En la gimnastikejo jam kolektiĝis multaj gepatroj kaj vilaĝanoj. La prezentado komenciĝis je la 9a kaj 20 minutoj. Jen estis la programo:

| | | | |
|----|------------------------------------|-------------|---|
| 1. | Saluto | 9:20-9:25 | Gelernantoj en la unua lernojaroj |
| 2. | Teatraĵo “Granda batato” | 9:30-9:50 | Gelernantoj en la unua kaj dua lernojaroj |
| 3. | Teatraĵo “Kio estas vera trezoro?” | 9:55-10:20 | Gelernantoj en la tria kaj kvara lernojaroj |
| 4. | Lernejestro salutas | 10:25-10:30 | |
| 5. | Paŭzo | 10:30-10:45 | |
| 6. | Kantoj | 10:45-10:55 | Ĉiuj lernantoj |
| 7. | Teatraĵo “Toŝiŝun” | 11:00-11:30 | Gelernantoj en la kvina kaj sesa lernojaroj |

| | | | |
|----|-------|-------------|----------------------------------|
| 8. | Fermo | 11:30-11:35 | Gelernantoj en la sesa lernoĵaro |
|----|-------|-------------|----------------------------------|

La nombro de la gelernantoj en la lernejo estas 53. En la kvara, kvina kaj sesa lernoĵaroj estas iom pli ol 10 gelernantoj, sed en la tria, 8, en la dua, 5 kaj en la unua, nur 3. Nun 5 kaj 3 gelernantoj en la du plej malaltaj lernoĵaroj kune lernas en la sama ĉambro. Kvankam malmultaj estas gelernantoj, ili estas viglaj kaj la voĉoj estas laŭtaj. Ĉiuj devas ludi sian rolon plene.



Gelernantoj en la unua kaj dua lernoĵaroj ludis “Grandan bataton”. Troviĝas fama rusa rakonto “Granda Rapo”, en kiu ĉiuj familianoj, eĉ malgranda muso, kune provas elfosi la rapon. La temo de “Granda batato” estas simila al ĝi, sed ne per forto la gelernantoj elfosas, sed per diversaj artoj ili vekas la bataton, ekzemple kantado, monociklado, *hulahoop*-ado (foto), kiujn ili lernis en la klaso. Do vere ili montras rezulton de la lernado.



La teatraĵo de la gelernantoj en la tria kaj kvara lernoĵaroj estis “Kio estas vera trezoro”. En la konkurso de trezoroj, diveraj grupoj kunportas kaj montras sian trezoron. Iu kunportas juvelojn, kiujn ili ŝtelis. Fine la unua premio estis aljuĝita al la grupo de geknaboj, ĉar geknaboj kreas la belan estontecon.



La teatraĵo de la kvina kaj sesa lernojaroj estis “Toŝiŝun”, temanta pri junulo en la periodo de Tang-dinastio en Ĉinio. Li heredis riĉaĵojn de la patro, sed baldaŭ foruzis ĉion kaj fariĝis almozulo. Tiam aperis mistera maljunulo kaj donis al li kvantegon da mono, kiun li baldaŭ same foruzis. En tiu vivo li eksciis, kiel vivi kiel sincera homo.

La scenejo kaj kostumoj estas belaj. Por fari tiujn, la gelernantoj kaj la instruistoj certe havis grandan penon. La knabino, kiu ludis la rolon de Toŝiŝun, memoris ĉiujn tekston bonege kaj ludis bele, kio emocigis la spektantojn en larmojn.



La gelernantoj de Tooni tre amas kanton. En la lasta jaro ili eĉ eldonis CD-on. Ili tre vigle kaj bele kantas, do estas granda ĝojo por mi aŭskulti iliajn kantojn en tiu okazo.

Kio estos la estonteco de la lernejo?

Post la prezentado membroj de la Fonduso donacis al la lernejoj liston de niaj donacoj, t.e. al la kursfinontoj de la elementa lernejo po 70 000 enoj (700 eŭroj) kaj al tiuj de la mezlernejo po 150 000 enoj (1500 eŭroj), entute ĉirkaŭ du milionoj da enoj el la mono donacita de la subtenantoj. Inter ĝi estas mono el esperantistoj en Vannes, Francio, transdonita en Lille. Ni planas daŭrigi tiun helpagadon ĝis 2020. Ni devos iri longan vojon, sed tio estas vojo por disvastigi bonon al la socio.

Nun la gelernantoj lernas en la provizoraj konstruaĵoj. Jam pasis pli ol 4 jaroj, do ili pli kaj pli difektiĝas. La konstruado de nova lernejo jam komenciĝis malantaŭ la provizoraj konstruaĵoj. Por tio nun ne ekzistas sportejo, kaj estas danĝero pro

ŝarĝaŭtoj. La nova konstruaĵo konstruiĝos en februaro 2017 kaj la naĝejo en februaro 2018. Ĝis tiam la nunaj gelernantoj devos elteni maloportunaĵojn.

Nova lerneja konstruaĵo estas nia espero, sed samtempe multaj vilaĝanoj havas timon, ke ĝis tiu tempo la elementa lernejo Tooni malaperos. Lastan jaron nur 5 lernantojn eniris kaj en tiu ĉi jaro nur 3. Se tiu tendenco daŭros, post 5 jaroj la nombro de la gelernantoj fariĝos malpli ol 30. La urbo volos kunigi la lernejon kun alia lernejo. Nova konstruaĵo sen lernantoj, tio estas terura imago, sed nun en multaj vilaĝoj en la tuta Japanio sama afero okazas.

Inter la digo kaj la vilaĝo, kie antaŭe estis multaj domoj, tie oni nun konstruas sportejon. Konstruado daŭras, sed kian estontecon la vilaĝo kaj la vilaĝanoj havos?

HORI JASUO